

revuo

esperanto

januaro 1968

61-a jaro

n-ro 746 (1)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)



ESPERANTO

revuo internacia



ivo

- 1 1968 (Lapenna)
Necesas vera dulingvismo (Sadler)
- 2 Komuna lingvo proponita por Kanado
Oficiala komunikaĵo de la Akademio
- 3 Nekrologo: Forpasis Ferenc Szilágyi
Konferenco traktis maŝintradukon (Falla)
- 4 "Diskobolos" (Holub/Felix)
- 5 Leteroj: La Monda Lingvo-Problemo
Nekrologoj Jui, Santiago, Schmid
- 6 CED
Leteroj: Pri interlingvistiko
- 7 Recenzoj
- 8 Mallonge
- 9 Esperanto en radio
Citaĵo
- 10 La Juna Vivo
- 11 53-a Universala Kongreso, Madrid, 1968
Ricevitaj eldonaĵoj
La internaciaj konkursoj 1967
- 12 Oficiala informilo n-ro 408
Anoncetoj

ila bildo

Regiona danco sur Kanariaj Insuloj: hispana provinco dek gradojn sude de Madrid

ojn liveris

- 3 Mogens Groth
- 4 Luigi Minnaja

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPE-
RANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88
Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1967): 18,75 gld. (kun membreco kaj jarlibro 25,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj. Unuopa numero: 1,— gld.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj: 0,45 gld. aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en ĉ. 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj kaj kulturaj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middx, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado, Postbus 412, Eindhoven, Ned.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 4, Germanujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 de Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk 1, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

D-ro Peter Zlatnar, estrarano pri kongresoj, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro Ulrich Lins, D-5 Köln-Dellbrück, Germarkenstr. 146, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: (01) 904 9081.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, 8057 Zürich, Svislando.

**oficiala organo
de universala
esperanto-asocio**

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

eranto
aro 1968

En 1968 Universala Esperanto-Asocio fariĝos 60-jara. La Estraro decidis memorigi tiun eventon ne per sentimentala retrorigardo al la pasinteco, sed ĉefe per plenumo de konkreta programo, kiu fortikigos la pozicion de la Asocio kaj altigos la prestiĝon de la lingvo en la nuntempo, kaj tial necese kontribuos ankaŭ al ilia estonteco. Temas, esence, pri nombro da diversdirektaj agadoj ligitaj al la Jaro de la Homaj Rajtoj, pri kio nia organo jam raportis kaj plue informados.

En tiu ĉi jubilea jaro nia komuna UEA, kun la helpo de ĉiuj, sukcese efektivigu sian Laborplanon kaj fariĝu pli forta ol iam antaŭe el ĉiuj vidpunktoj, inkluzive la nombron de la membroj.

Al la aliĝintaj organizaĵoj, komitatanoj kaj observantoj, ĉefdelegitoj, perantoj kaj delegitoj sukcesplenan laboron kun multaj pozitivaj rezultoj! Al la tuta membraro feliĉan kaj prosperan Novan Jaron!

Prof. d-ro Ivo Lapenna, Prezidanto

NECESAS VERA DULINGVISMO

Unu el la ĉefaj eraroj en la informado pri Esperanto (Principaro de Frostavallen, art. 13) estas: nomi la lingvon "helpa". Preskaŭ same malbone estas nomi ĝin "dua lingvo". Tiaj esprimoj povas komprenigi, ke Esperanto estas iel "duaranga", malpli valora, ol la naciaj lingvoj. Efektive, la internaciaj rilatoj postulas lingvon same kompletan, same esprimkapablan, kiel la naciaj. Kvankam lingvo internacia havas aliajn funkciojn, ol nacia lingvo, ĝia rango, ĝia valoro kaj prestiĝo, devas esti egalaj. Esperanto neniam ricevos sian rajtan lokon en la mondo, se ĝi prezentigas kiel lingvo duaranga kompare kun la naciaj lingvoj.

La esprimoj "helpa lingvo" kaj "dua lingvo" estas simptomoj de psika sinteno, kiun necesas definitive forigi el inter ni. Kompreneble, ĉiam ekzistas novaj lernantoj de Esperanto, komencantoj. Pri ili ne temas. Sed en la mensoj de ĉiuj, kiuj jam lernis ĝin, la Lingvo Internacia devus havi la saman rangon kaj ricevi almenaŭ tiom da respekto, kiel la nacia. La pozicio de Esperanto en la mondo estas ĉiam ligita al la prestiĝo, kiun ĝi havas ĉe la publiko. Kaj, siavice, ĝia prestiĝo ĉe la publiko dependas de la prestiĝo, kiun ĝi havas por ni mem, ĝiaj parolantoj. Tial necesas ĉiam strebi por plialtigi la pozicion de Esperanto en niaj propraj vivoj.

Kiel ni povas tion atingi? La prestiĝo de iu lingvo dependas de ĝiaj funkcioj — ĉu ĝi ludas rolon en la hejma vivo, en la klerigo, en la laboro, en la kultura vivo, aŭ nur en distraĵoj. La relativa graveco de tiuj diversaj roloj ne estas la sama por diversaj personoj, eĉ ne en diversaj landoj. Por iuj pli gravas la hejma vivo, por aliaj la laboro, kaj tiel plu. Ju pli gravaj estas tiuj aspektoj de la vivo, en kiuj Esperanto ludas rolon, des pli kreskas ĝia prestiĝo ĉe la uzanto.

Prestiĝo dependas ankaŭ de la ofteco de la uzado. Kvankam la internaciaj rilatoj daŭre plioftiĝas, tamen por la pli multaj homoj superregas la naciaj rilatoj kaj, sekve, la nacia lingvo. Ĉirkaŭas nin nacilingvaj afiŝoj, anoncoj

kaj aliaj surskriboj, radioelsendoj, samlingvaj laborkolegoj, ktp. Tio minacas forpuŝi la Internacian Lingvon sur la duan lokon.

Kompreneble oni uzu la nacian lingvon por naciaj celoj, la Internacian por la internaciaj. Sed tiu divido estas fakte trosimpligo. Estas en ĉies vivo multaj okazoj, kiam la lingvouzo estas NEK nacia, NEK internacia, sed persona aŭ privata. Kiam oni pensas aŭ meditas en soleco, kiam oni legas por si mem, kiam oni skribas en taglibro aŭ agendo aŭ ion ajn notas por si mem, tio estas uzoj nek naciaj nek internaciaj, sed privataj, kaj por ili same bone taŭgas unu lingvo kiel alia. Uzi Esperanton en tiaj okazoj signifas: kreskigi ĝian prestiĝon en nia propra psiko, firmigi la lingvoscion kaj fari kontraŭpezon al la premo de la nacia lingvo. Ni do kutimiĝu pensi kaj skribi en Esperanto, kiam ajn tio eblas, kaj legi Esperantajn librojn kaj gazetojn kaj aŭskulti Esperantajn radio-elsendojn, sonbendojn kaj diskojn, kiam ajn tio estas utila kaj oportuna. Komence necesas persisto kaj memdisciplino por establi kiun ajn personan kutimon, sed tiu stadio estas nur provizora.

Sed tie ne finiĝas la eblecoj. Inter la vasta socio nacia kaj la mikrokosmo de individua persono troviĝas alia unuo: la privata grupo, kiun konsistigas la proksimaj familianoj kaj plej intimaj amikoj. Se ili apartenas al diversaj nacioj, la uzo de Esperanto devus esti memkomprenebla. Sed ankaŭ samnaciaj familianoj kaj amikoj povas same bone uzi inter si Esperanton kiel la nacian lingvon. Ankaŭ tio apartenas al la kategorio de privata lingvouzo. Kiel konate, jam multaj familioj adoptis Esperanton kiel hejman lingvon. Tian lingvon neniu emas rigardi kiel "duan" aŭ "helpan" lingvon.

La leganto respondu al si mem honeste: Ĉu por vi la Internacia Lingvo kaj la nacia estas egalrangaj? Ĉu vi iel uzas (pensas, legas, aŭdas, skribas, parolas) Esperanton ĉiutage? Ĉu vi faras aritmetikon same rapide en Esperanto, kiel en la nacia lingvo? Se ne, ĉu vi rajtas nomi vin vere dulingva?

V. Sadler

Ĉiam pli ofte oni publike pridubas la efikecon de dulingvismo angla-franca kiel solvo de la lingva problemo en Kanado. Nun aperis propono, ke la lando akceptu planitan internacian lingvon kiel la oficialan.

Similan proponon jam plurfoje aŭdigis Kanada Esperanto-Asocio, sed la novaĵo ĉi-foje estas, ke la propono venas de ekster KEA: de s-ro John Green, eldonisto de ĵurnalo "Agassiz Advance" kaj filo de iama ministro pri eksterlandaj aferoj. En preskaŭ kutpaĝa artikolo en "Vancouver Sun" (240 000 ekz.) li malkaŝe priskribas la fiaskon de dulingvismo kaj, sen mencio pri Esperanto, kvazaŭ nekonscie priskribas ĝuste Esperanton.

Avertinte, ke dulingvismo povas konduki al disfalo de la ŝtato, Green konstatas: "Eĉ se ĝi ne kaŭzus disfalon, dulingvismo tamen restus malŝparo de homaj fortoj. Vere dulingva nacio devas ĉion diri kaj presi duoble...."

"Dulingvismon en si mem neni en Kanado vere apogas, efektive. Preskaŭ ĉiuj deziras unu solan lingvon, sed oni malkonsentas pri la lingvo elektota. Oni subtenas dulingvismon nur kiel malfeliĉo neevitebla, ĉar neni el la ĉefaj grupoj pretas cedi al la alia."

Rimarku pasante, ke Kanado havas aron da aliaj lingvaj grupoj, krom la angla kaj franca: nacimalplimultoj kiel la eskimoj kaj la enmi-

grintoj germanaj, polaj k.a. devus do esti minimume tri-lingvaj.

S-ro Green plue konstatas, ke la problemo ne koncernas nur Kanadon: "La moderna mondo bezonas novan lingvon preskaŭ tiel urĝe, kiel Kanado". Per tiaj argumentoj li kondukas al sia konkludo, ke necesus krei tute novan lingvon! Ĉu eble alian, ol Esperanto? Pri tio, neni vorto. Sed rigardu nur la ses "bazajn postulojn", kiujn Green listigas:

1) La sonoj de la lingvo estu klare distingeblaj unuj de aliaj, kaj ne tro multaj.

2) Ĉiu vorto havu nur unu signifon.

3) La signifoj estu oficiale difinitaj kaj neniam ŝanĝeblaj.

4) Pluraloj, gramatikaj finaĵoj, verbo-tempoj ktp estu simplaj kaj regulaj.

5) Aparta litero por ĉiu sono.

6) Neni regulo, kiu ne estas necesa.

Akceptinte tian lingvon, Green konkludas, Kanado fariĝus centro de kulturo, kiu iom post iom disvastiĝus tra la tuta mondo.

Ĉi tie mankas spaco por tro detaligi, sed sufiĉu diri, ke en ĉiu alineo Green priskribas lingvon, kiu tute bone povus esti Esperanto — dum, aliflanke, li ŝajne eĉ ne konscias, ke Esperanto ekzistas! Ĉu ne sufiĉe klara indiko ke por niaj Informaj Fakoj restas multo fareda?

natiko

OFICIALA KOMUNIKAĴO DE LA AKADEMIO

Petite de la Germana Esperanto-Asocio (DEB) "solvi la problemon de la pasivaj participoj laŭ Zamenhof", kaj de la unuanima Komitato de UEA "kiel eble plej baldaŭ" difini tiun solvon; samtempe konsultite de la Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE) kaj de la Esperanto-Unuiĝo de Germanaj Instruistoj (EUGI) pri la ĝusta senco de kvar tipaj frazoj, kiaj povas troviĝi en diplomatia, jura aŭ politika dokumento, nome:

1. "Ni garantias, ke la domoj detruitaj dum la milito estos rekonstruataj en 1970" = do la garantiantoj estos kvitaj:

A) se en la daŭro de 1970 oni komencos kaj daŭrigos la rekonstruadon;

B) nur se en la daŭro de 1970 oni finos la rekonstruadon.

2. "Mi promesas, ke mia ŝuldo estos pagita la 9-an de Majo" =

A) la ŝuldanto senŝuldiĝos la 9-an de Majo;

B) la ŝuldanto senŝuldiĝos plej malfrue la 8-an de Majo.

3. "Ni asertas, ke la aŭtomobilo de sro X estis efektive riparata la lastan semajnon" =

A) la lastan semajnon oni efektive okupigis pri la riparado de la aŭto;

B) la lastan semajnon oni efektive finis la riparadon.

4. "Via propono estis unuanime akceptita la 3-an de Junio" =

A) oni akceptis la proponon la 3-an de Junio;

B) oni akceptis la proponon antaŭ la 3-a de Junio.

la Akademio, per 26 voĉoj el 31 voĉdonintoj (kaj 6 kromaj blankaj voĉdoniloj) decidis kaj deklaras, ke en ĉiu el tiuj frazoj nur la senco A estas konforma al la tradicia lingvouzo de Zamenhof, kaj ke ĉia alispeca interpreto estas neoficiala. Tiu decido cetere nur konfirmas kaj kompletigas la rezulton de la voĉdono farita de la Akademio en Julio 1965 pri la senco de la pasivaj participoj en la Fundamento.

Ĉia eblo de dusenceco en la uzo de tiuj participoj estas do forigita per ĉi tiu decido kaj ni esperas, ke la aŭtoroj de lernolibroj de nun konsideros la ĉisuprajn modelajn frazojn en la senco aprobita de la Akademio.

La 25-an de Novembro 1967.

G. Waringhien, Prezidanto

P. Neergaard, A. D. Atanasov, Vicprezidantoj

R. Bernard, Sekretario

D. B. Gregor, Direktoro de la Gramatika Sekcio

D-ro Ferenc Szilágyi, ĉef-redaktoro de "Norda Prismo" kaj aŭtoro de pluraj tre konataj lernolibroj kaj belliteraturaj verkoj, forpasis la 1-an de decembro 1967. Ni perdis talentan verkiston kaj unu el la plej kapablaj publicistoj en nia historio.

Denaske (1 feb 1895, Budapeŝto) hungaro, li loĝis de post la tridekaj jaroj en Svedujo. Per siaj tradukoj kaj redaktaj laboroj li alportis al la internacia publiko kulturvalorojn kiel de Hungarujo, tiel ankaŭ de Svedujo: "Poemaro el Hungarlando" (1929), "La pentroarto en la malnova Hungarujo" (1932), "Hungara Antologio" (kunlaboranto, 1933), "Sveda Antologio" (same, 1934), "Humora novelaro" (de sveda aŭtoro Hasse Z., 1944), "Sveda novelaro" (1950) kaj "Ni en Skandinavio" (1956).

Tiu kvazaŭa du-nacieco sentiĝis foje ankaŭ en lia redaktado, tiel ke oni foje ŝercis, ke "Norda Prismo" estas iagrade ankaŭ hungara prismo. Lia vere internacia redakta agado komenciĝis ĉe la senmorta "Literatura Mondo", ĉe kiu li estis kun-redaktoro ekde 1931 ĝis ĝia postmilita malapero. Li estis ĉef-kunlaboranto ankaŭ de la "Enciklopedio de Esperanto" (1933). Sendependan publicadon li komencis en 1943 per la unua el la kvin "Rapsodioj" — variaj belliteraturaj kajeroj — kiuj aperis ĝis 1953. Sed jam en 1955 li povis fondi nian plej sukcesan kulturan revuon de post "Literatura Mondo": "Norda Prismo", kaj la ekvilibra va-

rieco kaj alta kvalito, kiujn ĝi dankas al lia redaktado, vivtenis ĝin tra ĉiuj atendeblaj sortoŝanĝoj.

Akcenti tiel unuavice la redaktoron Szilágyi ne signifas subtaksi la verkiston Szilágyi. Kiel originala novelisto (ekde "Trans la fabeloceano" en 1931, tra "La granda aventuro", 1945, kaj "Inter sudo kaj nordo", 1950, ĝis "Koko krias jam!" en 1955) li ĝuis tian reputacion, kiu nature elektigis lin kiel kun-redaktoron de la antologio "33 rakontoj" (1964). La unikan romanon "Tiel okazis aŭ Mistero minora" (1958) la recenzistoj ĝenerale taksis malpli alte, ol la literaturistoj. Poezion li verkis malpli abunde ("Dekdu poetoj", 1934).

Kiel la samlandano Baghy, Szilágyi estis longe aktiva ankaŭ sur la kampo lingva. Lerninte Esperanton en 1924, li jam en 1932 aperigis, sub la titolo "La simpla Esperanto", la prototipon de tiu dinamika lernolibro, kiu poste aperis en 7 naciaj lingvoj. Samstila kurso por progresintoj, "Ellernu!", sekvis en 1937. Pri liaj publikaj kursoj en Hungarujo kaj Svedujo, por kiuj li jam en 1932 uzis lumbildojn kiel helpilon, Kalocsay iam skribis: "Li donis tiom da nova spico al la Cseh-metodo, ke per tio estiĝis memstara Szilágyi-metodo".

En la organizita movado, Szilágyi estis i.a. sekretario de la Belartaj Konkursoj de 1953 ĝis 1957 kaj membro de la Lingva Komitato, poste Akademio, de 1930 ĝis la morto.



KONFERENCO TRAKTIS MAŜINTRADUKON

aŭtomo

Ĉu aŭtomata tradukado sukcesos? Pri tio regas tre diversaj opinioj, eĉ inter la fakuloj. Se ĝi sukcesos, ĉu ĝi malfortigos la argumentojn por internacia lingvo? Ankaŭ pri tio la opinioj varias, sed en ĉiu okazo necesas konsideri, (1) ke la skribaj interŝanĝoj estas nur parto de la tereno, kiun ampleksas la lingva problemo, (2) ke rekta verkado en internacia lingvo aŭ tradukado en nur unu internacian lingvon restos ĉiam pli ekonomia, ol tradukado en multajn lingvojn — egale, ĉu tradukas homoj, maŝinoj aŭ hom-maŝina kombino, kaj (3) ke aŭtomata, tre rapida tradukado povus solvi la problemon, kiel estigi en la Internacia Lingvo la amasiĝintan sciencan literaturon jam ekzistantan en diversaj naciaj lingvoj.

— Red.

Dum tri tagoj de aŭgusto okazis en Grenoble, Francujo, la Dua Internacia Konferenco pri Aŭtomata Traktado de Lingvoj. La plimulto da prelegoj temis pri la aŭtomata analizo de tekstoj, sed kelkaj okupiĝis pri la algebra teorio de lingvoj. Kvankam la teoriaj studoj prezentitaj koncernas permaŝinan tradukon, nur du prelegoj traktis tiun temon kiel tuton,

kaj unu alia priskribis la elektronikan vortaron, kiu helpas la tradukistojn de la Eŭropa Komunumo.

Unu studo analizis la utilecon, laŭ la prijuĝo de uzantoj, de fakaj tradukaĵoj el la rusa en la anglan. El 34 prijuĝoj (pri 19 artikoloj), 7 estis "meze bona — tempoperdiga je lego kaj nur parte komprenita", 20 estis "plejparte tre bona — kelkaj gravaj informoj eble perditaj", kaj 7 estis "plene adekvata". Rimarku, ke "plene adekvata" ĉi tie signifas: adekvata, por ke la fakulo akiru la informojn el la teksto, ne adekvata por — ekzemple — lernolibro. La aŭtoroj opiniis, ke ilia sistemo povus konkurenci, laŭ rapideco kaj kosto, kun tradukoj fare de homoj.


La plimulto da laboro pri permaŝina traduko celas tradukon el fremda lingvo en la propran. Aparte interesa estas la verko de d-rino Margaret Masterman el Cambridge, Britujo, per kiu anglalingvano nescianta la francan eble povos, per "diskutado" kun kalkulilo, produkti bonan laŭidiotisman francan tekston. La studo el Cambridge faras nur la unuajn paŝojn, sed ni povas antaŭvidi pluan evoluon en la direkto de hom-maŝina kunlaboro. M. E. Falla

DISKOBOLOS

Sed

*antaŭ la lasta turniĝo
iu flustris en lian orelon
de post lia dorso*

- Momenton,
ankoraŭ ni tion pritraktos,
pure formale,*
- Vi ne konas la situacion,
kamarado,*
- Principe ni bonvenigas
vian iniciaton,
sed vi devas kompreni,*
- oni nepre devas insisti
je principa
interkonsentiĝo
pri ĉiu ĵeto*



*Li sentis kiel
delikata sudana kano
ĉirkaŭvolvas lian pojnon,
li volis ekkrii,*

sed

*en la buŝo
subite li havis
dolĉan vaton de la ĉielruĝo,
liaj muskoloj ŝvelis
kvazaŭ tesalia granito,
sed
propre ne estis kialo.*

- Antaŭen,
iu diris,
bonvolu fari lokon,
nun ĵetos
Demosteno.*

*Kaj Demosteno
elpreninte sablograjnon
el sub la lango*

*lerte, fingropinte
flugigis ĝin
en lian okulon.*

- Hura, denove
unu mondrekordo,
oni kriis ĉirkaŭe,*

*la malespera furioza sennoma
Diskobolos
denove ĵetpretiĝis
ek el profundo de la genuoj,
sed tiam li jam estis
ŝtoniĝinta
kaj vidis nenion
nur unu solan
gigantan sablograjnon
de horizonto ĝis horizonto.*

Tiel li staris.

*Kaj post la angulo jam
estis venantaj
la unuaj lernejekskursoj
gvidataj
de la plej bonaj pedagogoj,
atentigantaj ĉefe
pri tiu laboro de la ŝultroj,
pri la kuraĝa homa koro
kaj la fiero elpaŝo
en direkto
al la eterno.*

El la ĉeĥa tradukis Eduard Felix

Aliajn verkojn de Holub kun biografia prezento vidu en "Esperanto" 1963, decembro, p. 211.

Diskobolos (disko-ĵetanto) de Miron, en la Vatikana Muzeo.

Mi tre entuziasmas pri la nova revuo. Dum longa tempo mi silente bedaŭris pri la malalta nivelo de sciencaj esploroj pri la internacia(j) lingva(j) problemoj(j), eĉ inter tiuj specialistoj, kiuj plej interesiĝas pri fremdlandaj aferoj. Ekz. antaŭ du-tri jaroj en la etnologia revuo "Anthropology Today" la problemoj de internacia lingvo por la uzado de etnologoj ricevis iom da diskutado. Mi vere miris, ke la rimarkoj kaj argumentoj faritaj de la multaj alskribintaj etnologoj estis proks. la samaj kiel tiuj farataj ordinaraj de ne-specialistoj. Tio tute ne indikas, ke la ne-specialistoj havas korektan vidpunkton, sed kontraŭe, ke la manko de scio kaj de antaŭpensado pri internaciaj lingvaj problemoj estas proksimume sama ĉe la du grupoj. Kaj tio estas ja bedaŭrinda afero! Do mi esperas, ke la nova revuo vere povos publikigi altvaloraĵajn studojn pri ĉi tiuj problemoj.

David K. Jordan
Tajvano, 12 okt 67

FORJETITA MONO?

Leginte la ĉefartikolon "Konsciigi la mondon pri la lingva problemoj" en "Esperanto" de Novembro 1967, mi devas diri, ke mi ne plu komprenas la Estraron de U.E.A.

Certe estas tre laŭdinde, ke nia eminenta prezidanto prof. Ivo Lapenna sola sukcesis akiri sumon de 20.000,— guldenoj.

Sed kial elspezi tiun monon por revuo "La Monda Lingvo-Problemo", pritraktanta sociajn, jurajn, politikajn, ekonomiajn, psikologiajn kaj lingvistikajn aspektojn de la lingva problemoj en la mondo?

La revuo estas destinita por intelektuloj kaj sciencistoj de la mondo, sed ĝi aperos en la naciaj lingvoj kun resumoj en Esperanto. Se juĝi laŭ la provizoraj titoloj kaj verkantoj de la studoj jam preparataj, la artikolo de Ralph Harry aperos en la angla lingvo, la artikolo de prof. Lapenna eble en la kroata lingvo, la studo de Juan Régulo-Pérez en la hispana, la artikolo de Barney Emmart kaj tiu de Richard Wood en la angla. Teorie estas eĉ eble, ke aperos studoj en lingvoj ĉina, japana, hungara, ĉeĥa, bulgara kaj aliaj lingvoj, kiujn praktike neniu intelektulo ekster la koncerna lando povas kompreni.

Kiun utilon tio havas por la intelektuloj en la mondo, kiuj ne kapablas legi la plimulton de la studoj? Oni donos resumojn en Esperanto, sed la sciencistoj ne scipovas Esperanton. Krome ili devas pagi abonkotizon de 25,— guldenoj jare. La sciencisto, kiu pagas tiun kotizon por revuo, kiun li plejgrandparte ne povas legi, ne estas scienculo, li estas stultulo.

Ni ne dubas, ke la temoj traktataj estas ege interesaj por esperantistoj kaj ke la resumoj en Esperanto estas valoraj por ili. Tamen la esperantistoj jam estas konvinkitaj de la utilo de la supernacia lingvo.

Tial la mono estas forĵetita ambaŭflanke.

Mi konscias, ke estas facile senkreditige kritiki. Tial mi volas ankaŭ aŭdigi pozitivan sonon:

Estus multe pli malmultekoste la planitajn artikolojn publikigi en landaj kaj internaciaj fakrevuoj, kiujn la scienculoj jam legas. Ni tiam ne bezonas elspezi eĉ unu cendon.

J. L. Muller,
Bussum, Nederlando, 14 nov 67

Kvankam teorie kiu ajn lingvo estas uzebla en "La Monda Lingvo-Problemo", oni kalkulas (certe prave), ke la granda plimulto de artikoloj aperos en la angla, franca, hispana, rusa aŭ germana, t.e. en la lingvoj plej multe legataj en la scienco. (Vidu "Esperanto", septembro, p. 119). Rilate la lingvojn la revuo do plejparte ne distingiĝos de aliaj jam aperantaj plurlingvaj sciencaj revuoj. Krome, se aperus artikolo en, ekzemple, la hungara, la plimulto de ne-hungaraj legantoj certe sufiĉe komprenus, pri kio ĝi temas, el la resume en Esperanto — eĉ se ili neniam studis la Internacian Lingvon.

Pri la vendebleco de la revuo la eldonfirmo, kun kiu CED pritraktas ĝian distribuon, havas tute alian opinion, ol s-ro Muller.

La valoro por tiuj legantoj, kiuj jam scias Esperanton, restas granda. Por efike informi pri la bezono de internacia lingvo oni bezonas kompreni la mondan lingvo-problemon en ĉiuj ĝiaj aspektoj. Bedaŭrinde, la esperantistoj (inkluzive la redaktoron de "Esperanto") ankoraŭ ne estas sufiĉe informitaj: ili ofte konas la problemon nur sur sia propra teritorio aŭ en sia propra medio.

Kompreneble oni povus publikigi la artikolojn en jam ekzistantaj revuoj. Sed unu el la ĉefaj karakterizoj de LMLP estos ĝia inter-

(daŭrigo sur p. 6)

PIONIRO BRULMORTIGIS SIN

ĈUNOŜIN JUI (1894-1967)

S-ro Ĉunoŝin Jui, delegito de UEA en Yokohama, brulmortigis sin per benzino la 11-an de novembro 1967 antaŭ la oficiala loĝejo de ĉefministro Sato, proteste kontraŭ la registara politiko. Li lernis Esperanton en 1921, kunfondis la Esperanto-societon en Nagoja en 1930 kaj en 1965 kompilis okaze de la 50-a UK la broŝuron "Japanujo hieraŭ kaj hodiaŭ".


PAULINO SANTIAGO

S-ro Paulino Santiago, la plej malnova delegito de UEA en Brazilo, mortis 79-jara la 10-an de oktobro en Maceió, Alagoas.

GUSTAV SCHMID (1893-1967)

Mortis en Wiener Neustadt, Aŭstrujo, la 11-an de oktobro s-ro Gustav Schmid, multjara membro kaj delegito de UEA kaj loka societestro.

nekrol



Ĉunoŝin Jui

esper
januaro

NOVA NOMO

Pro diversaj kaŭzoj, sed ĉefe por adapti la nomon de CED al ĝiaj nuntempaj laboro kaj taskoj, la Estraro de UEA decidis ŝanĝi la nomon de CED. Ĝis nun ĝia nomo estis: "Universala Esperanto-Asocio — Centro de Esploro kaj Dokumentado"; la nova nomo estas: "Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo", sed ĝi plue estos ĝenerale konata kiel Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED).

PERSEKUTOJ KONTRAŬ ESPERANTO

En la Jaro de la Homaj Rajtoj CED intencas publikigi aron da dokumentoj pri la lingva diskriminacio sur internacia nivelo kaj en naciaj kadroj. Apartan atenton oni dediĉos al la diskriminacio rilate la Internacian Lingvon. Pri tiu demando CED jam havas sufiĉe da fidindaj informoj, sed ofte mankas precizaj dokumentoj. Tial CED alvokas al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj unuopuloj helpi ĝin en tiu laboro. Estas bezonataj precizaj informoj kaj dokumentoj pri malpermeso de Esperanto-organizaĵoj aŭ perforta disigo de la ekzistantaj fare de la aŭtoritatoj en diversaj landoj; cenzurado de periodaĵoj; persekutoj kontraŭ personojn, kiuj okupis gvidan pozicion en la Esperanto-organizaĵoj; persekutoj pro la nura scio de la lingvo kaj ĝia utiligo en la praktiko; eksigado de libere elektitaj funkciuloj kaj altruda enoficigo de personoj ne ĝuantaj kon-

fidon. Sciigoj kaj dokumentoj pri eventuale aliaj formoj de persekutado aŭ grava diskriminacio estas bonvenaj. Ĉiuj informoj devas nepre esti dokumentitaj. Ekzemple, CED bezonas originalajn dekretojn pri malpermeso aŭ disigo, kun esperantlingva fidela traduko de la koncerna dekreto, aŭ fotokopiojn de tiaj dokumentoj. Se tio neniel estas havebla, bonvenaj estas personaj atestoj de iamaj funkciuloj aŭ de unuopuloj, kiuj estis viktimoj de persekutoj pro la scio kaj uzo de la lingvo. Ĉio ĉi ne rilatas nur al la pasinteco, sed ankaŭ al la nuntempo.

La koncernajn dokumentojn kaj informojn bv. sendi al la adreso de CED: 77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Britujo.

Donacoj por CED	£	ŝ	p
La stato je la 18-a de septembro 1967	133-14-	2	
Nov-Zelanda Esp.-Asocio	10-	0-	0
S-ro E. F. Dean, Britujo	16-	0-	0
S-ro H. Smits, Nederlando	1-	0-	0
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10-	4	
S-ro E. Burg, Nederlando	5-	0	
S-ro J. P. Jensen, Danlando	1-	0-	0
S-ro E. Burg, Nederlando	5-	0	
S-ro J. de Vries, Nederlando	2-10-	0	
La stato je la 2-a de decembro 1967	£ 165-	4-	6

Tutkoran dankon al ĉiuj donacintoj. Donacojn por CED akceptas C.O. de UEA, ĉiuj ĉefdelegitoj aŭ perantoj, aŭ la Oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

oj (daŭrigo)

faka konsisto, per kio ĝi espereble atingos legantojn en plej diversaj fakaj medioj. Artikolon pri la lingva problemoj en diplomatio, ekzemple, oni sendube povus aperigi en iu jura revuo, sed tiam ĝi ne atingus aliajn legantojn, ol juristoj. La celo de LMLP estas kompreni kaj komprenigi la lingvan problemon kiel tuton.

La nova revuo ne estas ia kaprica elpenaĵo, sed ĝin funde konsideris la Estraro de UEA jam dum pluraj jaroj, kaj la projekton aprobis la Komitato en Budapeŝto per ĉiuj voĉoj kaj du sindetenoj.

— Red.

PRI INTERLINGVISTIKO

Oportunas forigi gravan mankon en la bibliografio pri interlingvistiko donita en la novembra n-o de ESPERANTO, nome:

D-ro Monnerot-Dumaine: Précis d'Interlinguistique générale et spéciale (eld. Maloine, Parizo 1960),

kiu pritraktas la ĝeneralajn problemojn pri interlingvistiko, klasifikas, senpartie ekzamenas kaj komparas la ĉefajn projektojn pri "artefaritaj lingvoj", kaj plie donas kurtajn sciigojn

pri multaj aliaj projektoj (entute 364). La 210-paĝa franclingva libro grandformata estas siaspece unika kaj ĝisdata, do nepre nemalhavebla, plie facile legebla kaj agrabligita per bildoj, interalie pri esperantaĵoj.

Ankaŭ citinda estas la libreto "Planlingvaj Problemoj" de William Gilbert, kun antaŭparolo de W. Manders, aperinta ĉe Stafeto en 1962.

Paul Lobut
Parizo, 2 nov 67

Traktante la difinon de "interlingvistiko" en la n-ro 11/1967 de "Esperanto", s-ro Hauptenthal nomis la opiniojn esprimatajn pri tiu temo en "Interlingvistika Informa Servo" "ekstravagancaĵoj" kontraŭe al "seriozaj studoj". Ni ne povas sekvi s-ran Hauptenthal en tia maniero de diskutado kaj faris objektivan mallongan respondon en la n-ro 4/1967 de Interlingvistika Informa Servo, je kiu interesuloj estu atentigataj por eble kontakti kun ties redakcio.

D-ro Artur Bormann, D-ro Werner Bormann, Societo por Internacia universitata docento Lingvo, D-239 Flensburg, por Esperanto. Jens-Due-Str. 25. 14 nov. 67

Vesperkanto, poemaro de Hendrik Adamson. Eld. Stafeto, La Laguna, 1967, 131 p. 18 × 12 cm. 5,70 gld.*

Mi estas de multaj jaroj admiranto de la poemoj (kaj la prozo) de Adamson; kaj tial mi forte ĝojis ricevinte ĉi tiun kolektitan poemaron. Mi tre scivolis pri tiuj aldonaj poemoj, kiuj estus por mi tute novaj; tamen, trovinte ilin, mi konstatis, ke la ĉefaj kaj plej sukcesaj poemoj estis jam aperintaj, ĉu en "Dekdu poetoj" (1934, ne 1943, kiel asertas la ĉitieaj kovrilaj informoj), ĉu en la literaturaj revuoj. La aliaj ne estas malsukcesaj, sed ili aldonas malmulton al nia apreco pri la poeto.

Koncerne la jam konitajn, estas iom ŝokete trovi, ke preskaŭ neniuj el la malnovaj tekstoj reaperas neŝanĝite; jen vortoj ŝanĝiĝis, jen tutaj versoj, jen (ekzemple en "Pri propraj aferoj", sub nova titolo "Kial?") tuta strofo elfalis. Estas tre ĝene trovi anstataŭ multjare amitaj versoj, ekz-e:

"Ho ni vulpegoj kun multaj kulpegoj!

Abundas parol', mankas faro"

("Nia Plimulto"),

la revizion:

"Ho, jen ni, vulpoj kun multe da kulpoj!

Paroloj, paroloj, sen faro"

(nova titolo: "Grumblo inter ni"),

— tiom pli, ĉar la nova teksto estas (kiel en la plimultaj lokoj) nepre malpli trafa.

Restas nerespondita la demando, kiu faris tian fundan revizion de la tekstoj: ĉu la poeto mem? Aŭ ĉiu eble la redaktinto de ĉi tiu volumo, d-ro Kalocsay, kiu jam publikigis en "Norda Prismo" reverkitajn tekstojn de niaj pioniraj poetoj? Espereble Kalocsay ne permesis al si nerespondecan "korektadon" de la poemoj de tia matura poeto, kiel Adamson... Eĉ se la ŝanĝoj estas aŭtoraj, mi ege bedaŭras la plimultajn; ŝajnas al mi, ke "plibonigoj" sub la frida lumo de postinspiro arde forĝitan tekston ne ĉiam... plibonigas.

Malgraŭ tio, oni nepre bonvenigu ĉi tiun testamenton de unu el niaj vere atentindaj poetoj (poeto ankaŭ en la estona), kies sincero, en la plej sukcesaj poemoj, fandiĝas kun lingva volupto tiel, ke ĝi vekas fortan simpatian en la leganto.

W. Auld (Skotlando)

Japanaj popolkantoj, tr. Kikunobu Matuba. Kantas Masako Hirakawa. Eld. Amo-Akademio, Japanujo, (1967). Disko fleksebla, 17 cm. diam., unuflanka, 33 r/m.* 2,25 gld. (kun tekstoj kaj muziknotoj).

La tri kantoj, kun fortepianaj akompanaĵoj, estas melankolie allogaj. La voĉo de la kantistino estas bela, sed, bedaŭrinde, malmultaj el la esperantaj vortoj estas orele kompreneblaj. Ĉefa kaŭzo verŝajne estas la ofte neaŭdeblaj konsonantoj. Krome la vokaloj ne ĉiam estas tute klaraj, kaj la intence neesperantaj sonoj (ekz. yo-, ĉ-) ne faciligas la komprenadon.

Feliĉe, la eldonistoj kune provizas la esperantan tekston (kun aldonaj nekantitaj strofoj) kaj la muziknotojn. La presado estas klara kvankam iom pala. Kelkaj preteraroj troviĝas ĉe la muziknotoj.

La tri arioj uzas kvinnotan minoran skalon, sed la akompanaĵo de la unua kanto utiligas la eŭropan septon harmoni-minoran skalon.

W. G. Atkinson (Britujo)

Junul-kurso. Prononcekzemploj. Eld. SAT-Amikaro, Paris (1967). Serio de 5 diskoj flekseblaj, 33 r/m, 18 cm diam., duflankaj. 9,— gld.*

"Junul-kurso" estas abunde ilustrita rekta-metoda lernolibro (elementa), tre uzata lastatempe ĉe ni, en Brazilo. Sed ĝi estas internacie uzebla, ĉar ĝiaj (tre koncizaj) gramatikaj notoj estas mendeblaj, laŭelekte, en la franca, hispana aŭ portugala.

Nun al la bona lernolibro aldoniĝas kolekto de 5 disketoj (33 r/m) entenantaj ĉefajn el

la 20 lecionoj de la Kurso.

La (du) geparolistoj de la kolekto havas belegan voĉon, vere "internaci-stilan", tiel ke oni apenaŭ rekonas ilian naciecon. La enhavo de la diskoj vere reprezentas la gravaĵojn de la lecionoj. Kaj la materialo estas tiel bone distribuita sur la diskoj, ke iu ajn kapablas ilin sekvi je la libro. Ankaŭ teknikaflanke ĝi estas laŭdinda: la sono ĉiam neta kaj harmonia.

Tamen... en kelkaj vortoj la vokaloj "e" kaj "o" prononciĝas iom pli "malfermitaj", ol en la ceteraj; kaj dufoje "hodiaŭ" estas prononcata "hodiAŬ". Sed pri tiuj preskaŭ negravaj misetoj oni antaŭe avertu la lernantojn — kaj la problemoj solviĝas.

Jair Salles (Rio)

Rakontoj pri Liu Hulan. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1966. 40 p. 20,5 × 18 cm., kolorilus. Por infanoj. 0,90 gld.*

Bildrakonto en koloroj pri ĉina nacia heroino — nur dekkvinjara, kiam ŝi martiriĝis. Ankoraŭ unu modela legolibro en longa serio el Ĉinujo. Se nur aliaj landoj simile elĉerpis rakontojn el la nacia historio kaj eldonigus ilin tiel alloge, kiel faras la ĉinoj, tiam Edukado por Internacia Interkompreniĝo multe pli facile efektiviĝus en la lernejoj, kie Esperanto estas instruata. La libron mi forte rekomendas por individua aŭ klasa uzo, kaj por ĉiuaĝaj legantoj. Bona premio aŭ donaco por infano.

Raif Markarian (Britujo)

"Ricevitaj eldonaĵoj" aperas sur p. 11.



Paskal V. X. Sao

PERSONE

Nguyen van kinh

- Revenis al Hanojo s-ro Nguyen van kinh, dum pluraj jaroj ambasadoro nord-vjetnama en Moskvo, membro-abonanto de UEA.

Sao

- Paskal Sao, prezidanto de Tanzania Esperanto-Asocio, dum unu jaro studas publikan kaj komercan administradon en Svedujo sub aŭspicio de la sveda registaro.

Sunardo

- S-ro Eriko Sunardo (antaŭe Khwat liat Kho), delegito en Djakarta, enoficiĝis kiel ataŝeo indonezia en Parizo.

Vermaas

- En novembro la direktorino de la C.O. de UEA, f-ino M. H. Vermaas, kombinis libertempon kun prelegoj kaj kursoj en Meksik-urbo.

FAKE

Diplomatia

- La vizitkartoj de la Nederlanda Ministrejo de Eksterlandaj Aferoj, uzataj en ĉiuj nederlandaj ambasadoj tra la mondo, de nun havas tekston seslingvan: en 5 naciaj lingvoj kaj Esperanto.

Fervojo

- 164-paĝa studo pri internaciaj fervojaj vartarifoj, eldonita serbakroate en Beograd, 1967, kaj verkita de Gvozden Sredić, enhavas 4-paĝan resumon en la Internacia Lingvo.

Filatelo

- Esperanto-Ligo Filatelista kreis servon por interŝanĝo de filatelaĵoj, kiuj koncernas Esperanton. Informas la delegito de Soltau, Germanujo.

Kolektado

- Ĉar ĝis nun ekzistas pluraj paralelaj Esperanto-organizaĵoj de kolektantoj, ĵus fondiĝis Unuigita Komitato de la Esperantista Kolektanta Movado, ĉe s-ro R. Melo, 15, Rue de la Richelandière, F-42-St-Etienne, Francujo. Ĝi jam registris pli ol 1500 adresojn.

Literaturo

- D-ro Italo Chiussi, orientologo loĝanta en Frankfurt/Main, ĵus kompletigis Esperanto-tradukon de la Korano el la araba originalo. Konata eldonejo konsideras ĝin por publikigo.

Politiko

- Ekaperis en Milano (Viale Montegrappa 10, I-20124 Milano, Italujo) multobligita gazeto en Esperanto sub la titolo "Spegulo de imperiismo kaj reviziismo".

Stratoj

- Novajn Zamenhof-stratojn havas Ripollet en Hispanujo (8 okt 67) kaj Natanja en Israelo (meze de aŭgusto 67). Nova Zamenhof-monumento staras ĉe la ŝoseo Rio de Janeiro - Belo Horizonte (Brazilo).

Turismo

- Inter la ĉiam pli oftaj turismaj prospektoj en Esperanto elstaras de post la 51-a UK la

hungaraj. Unu el la plej elegantaj ĝis nun estas la ĵus aperinta 24-paĝa kolora broŝuro pri lago Balaton, ricevebla de: Dél-balatoni Idegenforgalmi Hivatal, Siófok, Szabadság tér 6, Hungarujo. Krome aperis novaj prospektoj pri Békéscsaba (Hungarujo), Wien (Aŭstrujo), la Fervojmuzeo en Hamar (Norvegujo) kaj pri Norvega Ŝtata Fervojo.

LOKE

Ĉeĥoslovakujo

- En Slovakujo komenciĝas en januaro 1968 radio-kurso de Esperanto.

Francujo

- Aperis franclingva biografio "Aimé Cotton" en eldono de Seghers, Parizo. Aimé Cotton, eminenta optikisto kaj iama prezidanto de la Franca Akademio de Sciencoj, parolis Esperanton kaj ĉeestis nombron da Universalaj Kongresoj. Pri tio troviĝas pluraj mencioj en la biografio.

Hindujo

- La Esperanto-grupo ĉe la Publika Biblioteko en Delhi havas fruktodonan kunlaboron kun lokaj kaj alilandaj bahaanoj (mond-religianoj): komunan kunvenon je 27 okt 67 partoprenis pli ol 200 personoj el diversaj landoj.

Japanujo

- La aŭtoro de la monumenta biografio romano "Zamenhof", kies 620-paĝa unua parto aperis ĉi-jare, ĵus finis la manuskripton de la same ampleksa dua parto. La libro estas japanlingva.

Jugoslavio

- Esperantistoj el 19 landoj somerumis ĉi-jare en Primošteno, kie la turisma oficejo nun havas 3 esperantlingvajn oficistinojn. Oni ankaŭ ekipis apartan "Esperanto-ĉambron".

Kanado

- La Esperanto-stando en la Mondekspozicio, nun finita, disvendis 400 anglajn kaj 250 francajn lernolibrojn jam dum la unuaj tri monatoj.

Polujo

- En 1968 aperos disko-kurso de Esperanto por pollingvanoj kun akompana lernolibro. Aŭtoro: Andrzej Pettyn.

Portoriko

- Formiĝis Esperanto-rondo en la Universitato de Portoriko.

Unuiĝintaj Nacioj

- La kanada delegacio petis la Sekretariaton de UN efektive apliki la principon de egaleco inter la lingvoj oficialaj, kaj aparte petis, ke la franca reprenu tiun pozicion, kiun ĝi perdis, kiam la angla establiĝis kiel la ĉefa laborlingvo ĉe UN. (Laŭ "Dernières Nouvelles d'Alsace, 23 nov 67).

Usono

- Komitato de la Cambro de Reprezentantoj pristudas leĝopropozonon de 24 kongresanoj por instruado de la hispana lingvo en la ŝtataj lernejoj. Preparoj por la enkonduko kostus pli ol unu dolarmiliono.

Ciujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-PARIS 16, Francujo. En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Por aliaj horsistemoj vidu la jarlibron 1967, 1-a parto, pp. 130-131. Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.



Ciutage	15.30-16.00	Warszawa, 50.25 m (5970 kcs), 42.11 m (7125 kcs), 41.99 m (7145 kcs), 31.50 m (9525 kcs), 25.99 m (11725 kcs), 25.42 m (11800 kcs), 25.09 m (11955 kcs). P. Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Warszawa, Pollando.
	19.30-19.45	Budapest, 240 m (1250 kcs), 75.09 m (3995 kcs), 48.10 m (6234 kcs), 30.51 m (9833 kcs), 25.19 m (11910 kcs), 16.77 m (17890 kcs), 13.83 m (21685 kcs). Radio Budapest, Esperanto-dissendoj, Budapest VIII, Hungarujo.
Dimanĉo	11.00-11.30	Pekino, 47 m, 40 m. I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.
	12.30-13.00	Pekino, 25 m, 19 m. I.
	12.30-13.00	Sorocaba, 278 m (1080 kcs). I.K. Radio Clube de Sorocaba (São Paulo), Brazilo.
	20.00-20.20	Roma, 50.08 m (5990 kcs), 41.24 m (7270 kcs), 30.90 m (9710 kcs). P. Radio Roma. Esperantofako, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	20.05-20.30	Sofia, 50.62 m (5920 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	21.30-21.45	Teresina, 210 m (1430 kcs), 88.63 m (3385 kcs). I. P. Radio Clube de Teresina, Rua Barroso 175, Teresina (Piauí), Brazilo.
	23.30-23.55	Sofia, 49.42 m (6070 kcs), 31.38 m (9560 kcs). P.
Lundo	00.15-00.45	Muritiba, 216 m (1390 kcs), I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
	12.05-12.15	Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 19.60 m (15305 kcs), 13.94 m (21520 kcs). P. (D-ro A. Baur). Svisa Radio, S.O.C. Bern-16, Svislando.
	22.45-23.00	Valencia, 278 m (1079 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
Merkredo	6.45- 6.55	Gdańsk, 230 m (1304 kcs). I. Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk, Poll.
	12.05-12.15	Bern, kiel lunde. (S-ro C. Gacond).
	18.45-19.00	Resende, 196 m (1530 kcs). P. Radio Agulhas Negras ZYP 22, Praça Oliveira Botelho, Resende (Rio de Janeiro), Brazilo.
	23.05-23.30	Bilbao, 212 m (1412 kcs). I. P. Radio Bilbao, Apartado 1117, Hisp.
Ĵaŭdo	21.50-22.00	Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 31.27 m (9595 kcs), 25.25 m (11880 kcs). P. (D-ro Baur).
	23.05-23.20	Zagreb, 264 m (1133 kcs). P. Radio Zagreb, Jugoslavujo.
	23.05-23.20	Beograd, 439 m (683 kcs), 48.78 m (6150 kcs). P. (programo de Zagreb).
Vendredo	13.15-13.30	Rosario, 229 m (1310 kcs). P. Radio Nacional, Cordoba 1331, Rosario (Santa Fe), Argentino.
	14.30-14.45	Wien, 203 m (1475 kcs), P. Radio Wien, Argentinierstr. 30a Wien IV, Aŭstrujo. (ĉiun alternan vendredon).
	20.00-20.30	Pekino, 45 m, 42 m, 39 m, 38 m, 32 m. I.
Sabato	11.00-11.30	Pekino, kiel dimanĉe.
	12.30-13.00	Pekino, kiel dimanĉe.
	20.00-20.30	Pekino. Kiel vendrede.
	21.50-22.00	Bern. Kiel ĵaŭde (S-ro Gacond).
	22.00-22.30	Uberlândia 191 m (1570 kcs), I.K. Rádio Cultura de Uberlândia, Minas Gerais, Brazilo.

NOTO: La stacioj Warszawa, Pekino, Bern, Roma regule sendas senpagan programon de siaj elsendoj al petantoj.

RADIO ROMA. 7-I, Tra la literaturo; 14-I, Novaĵoj el Italujo; 21-I, Italaj kanzonoj en Esperanto; 28-I, Leterkesto: 4-II, Collodi, la aŭtoro de la infanromano "Pinokjo"; 11-II, Italaj belartaj urboj: Pistoia; 18-II, Kiel naskiĝis la statuo "Perseo" de Cellini; 25-II, Mozaikoj en la baziliko de S. Marko en Venecio. La dua parto de ĉiu elsendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto". Redaktoro: Luigi Minnaja.

CITAJO

Prof. d-ro J. Kistemaker, direktoro de la Instituto por Atoma kaj Molekula Fiziko, Amsterdam: "Pro sia multelingveco Eŭropo ne faros gravajn progresojn en la venontaj 25 jaroj. ... Ĝi ne povas efike labori, ĉar la multaj lingvoj malhelpas adekvatan komunikadon kaj oni ne plene akceptas unu la alian sur la lingva kampo." (Laŭ "Algemeen Dagblad", 24 nov 67).

esperanto
januaro



LA JUNA VIVO

Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando

LA 24-a KONGRESO DE TEJO

Tarragono fariĝos, post malpli ol 8 monatoj, pli ol nura nomo. Ĝi estos konkreta memoro por espereble multaj TEJO-membroj. Jen jam la unuaj provoj ligi imagon promesplenan al la vorto Tarragono.

La urbo, kun 65 000 loĝantoj, situas sur monteto apud la mediteranea marbordo. La ĉielo estas blua, sed la temperaturo kutime ne altiĝas super 24°. Jam la antikva armeestro Marciano skribis en la 2-a jarcento: "La klimato estas tie tre dolĉa, kaj la jaro konsistas el senĉesa printempo."

En tiu tempo la urbo jam ekzistis minimume 800 jarojn: ĝi fondiĝis pli ol 600 jarojn antaŭ Kristo. En la jaro 218 a.K. la romiaj armeoj ĝin konkeris kaj ŝanĝis ĝin en fortan citadelon. "Tarrako" signifas "citadelo", kaj la urbo fariĝis ĉefurbo de la romia Hispanujo ĝis la alveno de la barbaroj en la 5-a jarcento. Ankaŭ nun ĝi posedas la rangon de eklezia ĉefurbo de la princlando.

Kvankam TEJO ne jam posedas similajn honorindan aĝon kaj famon, ĝi tamen estas tre bonvena surloke, laŭ aserto de LKK. Jen la invitantoj: José Serrano (prez.), Salvador Aragay (vic-prez.), Magencia Garcia de Font (sekr-ino), Juan Font (kasisto), Francisko Ruiz (ekskursoj), Jordi Guma (gravuraĵoj), Jaime Aragay (informado), Evelio Calvet (aŭtoritataj ril.), Josefina Girona de Aragay (sekr. aferoj).

La kongresperiodo, de 27 julio ĝis 3 aŭg., pleniĝos per i.a. interamikiĝa vespero, inaŭguro, laborkunsidoj, balo, inaŭguro de Junulara Restadejo Esperantista, kulturaj prelegoj, oratoraj kaj sportaj konkursoj, inaŭguro de Strato Zamenhof, amuzaĵoj kaj (bedaŭrinde) fermo.

Pliaj informoj, i.a. pri kotizoj, baldaŭ aperos. La adreso de LKK estas: s-ro Salvador Aragay, str. Arce 8-2-4, **Cornella**, Hispanujo.

(rap S. Aragay)



ranto
aro 1968

JIHLOVA apud PRAHA

Ĝi estis la scenejo por la Internacia Junulara Esperanto-Seminario, kiun modele aranĝis Ĉeĥoslovaka Esperanto-Junularo en julio ĉi-jare. Inter la 40 partoprenantoj el 12 landoj estis Ivo Osibov (repr. de TEJO), Claude Nourmont (repr. de STELO), kaj Andrzej Grzebowski (Tur. Servo). Kune ili aŭskultis prelegojn pri la Esp. movado kaj aliaj porgvidantaj temoj, ekskursis, amuziĝis, kaj kreis bonegan etoson. Decas laŭdi pro tio ankaŭ la organizantojn, kiuj sub gvido de Mikulaš Nevan certe kunulpas pri la sukceso. Ĝi estis la unua internacia junulara aranĝo en Ĉeĥoslovakio; malgraŭ tio kaj malgraŭ la tre malfrua anonco la plej sukcesa ĝis nun...

(rap. Tur. Servo de TEJO)

V-a JUBILEA BANJO-TENDARO EN FUNKA

Kiel ĉiujare la Vojevodio Komandantaro de Pola Skolta Asocio en Bydgoszcz aranĝis BANJO-tendaron kun Esp. subtendaro, dum aŭgusto. Ne ĉiuj LS-oj de TEJO profitis la senpagan akcepton de skoltaj delegacioj en la tendaro. Nur seppersona delegacio de HEJ, gvidata de Maria kaj Vilmos Benczik, partoprenis. Ili, kaj krome kvardeko da polaj espistaj skoltoj zorgis pri tio, ke la ĉefaj kaj vojevodiaj instancoj de Pola Skolta Asocio tamen estis kontentaj. Entute ĉeestis 320 skoltoj kaj skoltinoj.

En Funka oni instruis al 40 skoltoj-instrukciantoj dum du semajnoj, ĉiutage. Rezulte la partoprenantoj aranĝis poste "Konferencon de Junularaj Vojaĝoficejoj", nur en Esperanto.

(rap. Tur. Servo de TEJO)

POLA ESPERANTO-JUNULARO

havas novan adreson: ul. Jasna 6, Varsovio. Sekve de grava kunsido de PEA kaj PEJ oni decidis reorganizi PEJ per starigo de 17 vojevodiaj (departementaj) estraroj. Danke al tio PEJ havos sekvontjare antaŭvideble ĉ. 2000 membrojn. Oni enkondukis novan regularon, verkitan de M. Pietrzak kaj R. Dobrzynski. Anstataŭ Komitato nun 26-persona estraro (inkl. la 17 vojevodiajn prezidantojn) gvidos la laboron. Oni fondis Lernejan Fakon de PEJ, sub gvido de Witold Sośnicki, SSR, ul. Lumumby 16/20, Łódź. La Informan Fakon prizorgos Władysław Palaszewski, ul. Komandorska 13/5, Gdynia.

En Torun Andrzej Grzebowski komencas la duan jaron de lektorado de Esp-o en la Universitato Nikolao Kopernik, dum entute 6 horoj semajne. 88 komencantoj kaj progresintoj sekvas la kursojn. La 1-an de novembro krome ekfunkciis lektorado pri Esp-o en la Medicina Akademio de Gdansk; ĝin gvidas prof. J. Toczyski.

(inf. A. Grzebowski)

Laŭ raporto de la Turisma Servo de TEJO, okazis dum la jaro 1967 20 internaciaj junularaj Esperanto-aranĝoj.

Sur tiu ĉi loko la kongresanoj inaŭguros la Junularan Restadejon Esperantistan.

53-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Madrid, 3-10 aŭgusto 1968

Alta Protektanto: Ĉef-Generalo Francisco Franco, Ŝtatestro de Hispanujo.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 4 Rotterdam, la 4-an de decem. '67

Kotizoj

La personoj, kiuj deziras pagi en pesetoj, bonvolu atenti, ke pro la devaluto de tiu mono la kotizoj en pesetoj pli frue anoncitaj kaj presitaj sur la aliĝilo estu rekalkulitaj laŭ la kurzo: 1 gld. = 20 pesetoj.

Karavano

Anoncis karavanon al Madrid la Esperanta

Societo en Ljubljana, Jugoslavio. Por pliaj detaloj oni sin turnu al la menciita Societo, Tavĉarjeva 2/1.

Glumarko

Estas aĉetebla ĉe la Libro-servoj de la Landaj Asocioj kaj de UEA bela kolora glumarko eldonita okaze de la 53-a UK. Prezo: 0,50 gld. (2 st.) por 10-marka folio.

Statistiko (je 4 dec 67)

Arg. 1, Aŭstral. 1, Aŭstrujo 2, Bel. 10, Braz. 2, Brit. 23, Bul. 14, Ĉeĥ. 2, Dan. 9, Finn. 5, Fra. 36, Ger. 15, Grek. 1, Hisp. 53, Hun. 8, Isr. 1, Ital. 14, Jap. 3, Jug. 16, Kan. 3, Meks. 1, Monako 1, Ned. 22, Norv. 3, NovZ. 1, Pol. 9, Portug. 3, Sov. I, Sve. 15, Svis. 3, UAR 1, Us. 11; entute 290 el 32 landoj.

G. G. Pompilio,

Konstanta Kongresa Sekretario



RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Pli ol fantazio, rakonto de Agnes Bøgh-Høgsted. El la dana C. Graversen. Foto-represo Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhøj 1967. 70 p. 20,5 × 15 cm.* 4,50 gld.

Kantoj de niaj patroj. Komp. K. Gusev. Eld. Komisiono de Sovetaj Esperantistoj, Moskvo, 1967. 90 p. 21 × 15 cm., ofsetita, kun muziknotoj.* 0,75 gld.

Okuloj, novelaro de Marjorie Boulton. Eld. Stafeto, La Laguna, 1967. 177 p. 18 × 12 cm. 6,85 gld.*

Fajro sur mia lango, poemaro de Edwin De-Kock. Eld. Stafeto, La Laguna, 1967. 119 p. 18 × 12 cm. 5,70 gld.*

Si ikke at det er overflødig, også du kan bruke Esperanto, verdensspråket. Eld. NEFA, S-ro Odd Kolbrek, Kalbakstubbene 22, Oslo 9, Norvegujo. 24 p. 21 × 15 cm., ofsetita. Norveglingva broŝuro por fervojistoj.

Esenco kaj agado de la konsumkooperativoj en Bulgario. Eld. Centra Kooperativa Unuiĝo, Sofio, 1967. 33 p. 21 × 16 cm., ilustr.*

Bonan nokton! kaj 3 aliaj kantoj de Miŝo Zdravev. Eld. Balkanton, Sofia, (1967). Disko 33 r/m, 17 cm. diam., duflanka.

Zorgu la vivon de la amasoj, priatentu metodojn de laboro, de Maŭ zedong. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1967. 8 p. 15 × 10 cm. 0,25 gld.*

Bestkalendaro 1968. Eld. Reinsteg-Verlag, Germanujo. 12 p. 42 × 30 cm., kun kolorpresitaj pentraĵoj. Ampleksaj tekstoj germana kaj Esperanta. Prezo: 4,— gld. (4,50 g.m.) ink. afrankon, mendebla ĉe Esperanto-Rondo (A. Burkhardt), D-7261 Gechingen, Brunnenstr. 4, Germanujo; pĉk. Stuttgart 29 777.

Paroladoj ĉe la literatura kaj arta kunsido en Jan-an, de Maŭ zedong, Dua eld. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1967. (Represo). 55 p. 15 × 10 cm. 0,40 gld.*

Stato kaj revolucio, de N. Lenin (V. Uljanov). El la rusa tr. G. Demidjuk. Foto-represo Pirato, Oosaka, 1967. 150 p. 17,5 × 12 cm. 4,80 gld.*

Interparolo kun usona jurnalistino Anna Louise Strong, de Maŭ zedong. (Dua eld.) Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1967. 9 p. 14,5 × 9,5 cm.

Raporto al la dua plena sesio de la sepa Centra Komitato de KPC, de Maŭ zedong. (Dua eld.) Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1967. 32 p. 14,5 × 9,5 cm.

100 jaroj de slovaka gimnazio. Martin 1867-1967. Eld. Meza Ĝeneralkleriga Lernejo, Stredná škola, Medvecký str. 4, Martin, Ĉeĥoslovakujo. 26 p. 16 × 14 cm., ilus. 1500 ekz. Senpaga?

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1967

stato je la 30-a de novembro 1967

Konkurso I

Lando	kvoto	poentoj	%
1. (2) Japanujo	3965	3795	95,71
2. (1) Hispanujo	3250	3010	92,62
3. (2) Italujo	4220	3840	91,—
4. Francujo	7752	6859	88,48
5. (7) Belgujo	2055	1800	87,59
6. (5) Svedujo	7180	6195	86,28
7. (6) Nederlando	5975	5136	85,96
8. Danlando	3099	2636	85,06
9. Germanujo	7221	6010	83,23
10. (11) Usono	4526	3765	83,19
11. (10) Britujo	6691	5514	82,41
12. Finnlando	3160	2315	73,26
13. Svislando	2459	1745	70,96
14. (15) Brazilo	3856	2472	64,11
15. (14) Jugoslavio	5375	3380	62,88

Konkurso II

1. (8) Grekujo	270	365	135,19
2. (1) Kanado	1124	1311	116,64
3. (2) Islando	250	260	104,—
4. (3) Israelo	595	615	103,36
5. (4) Aŭstrujo	1475	1265	85,76
6. (5) Aŭstralio	1475	1169	79,25
7. (6) Sudafriko	260	200	76,92
8. (7) Nov-Zelando	1481	1128	76,16
9. Norvegujo	1755	1065	60,69
10. Argentino	905	540	59,67
11. Madagaskaro	250	143	57,20

(Vidu la regulojn sur paĝo 33. Interkrampaj ciferoj indikas pasintmonatajn poziciojn.)

esperanto
januaro 1

UEA-KOTIZOJ POR 1968

Pro la pluraj lastatempaj kurzoŝanĝoj ni presigas ĉi-sube detalan kotiz-tabelon por 1968. Membroj en Nov-Zelando bonvolu aparte atenti, ke la nova kotizo MA menciita en la decembra "Esperanto" estis erara. La korektajn ciferojn vidu ĉi-sube.

Lando	MJ	MA	MS	J-MJ	J-MA	Valuto
		MA-K			Ab.	
Aŭstl.	3,25	6,50	9,75	1,60	5,—	dol.
Aŭstj.	90	180	270	45	135	ŝil.
Belg.	170	340	510	85	255	fr.
Brit.	29/—	58/—	87/—	14/6	43/6	ŝil.
Dan.	27,50	55,—	82,50	13,75	41,25	kr.
Finn.	16,—	32,—	48,—	8,—	24,—	mk.
Franc.	17,50	35,—	52,50	8,75	26,25	F.
Germ.	15,—	30,—	45,—	7,50	22,50	mk.
Grek.	100	200	300	50	150	dr.
Hind.	25/—	50/—	75/—	12/50	37/50	rup.
Hisp.	240	480	720	120	360	pes.
Irl.	29/—	58/—	87/—	14/6	43/6	ŝil.
Ital.	2250	4500	6750	1125	3375	lir.
Jug.	27,50	55,—	82,50	13,75	45,—	din.
Kan.	3,75	7,50	11,25	1,90	5,60	dol.
Mad.	875	1750	2625	450	1315	FMG
Ned.	12,50	25,—	37,50	6,25	18,75	gld.
Norv.	25,—	50,—	75,—	12,50	37,50	kr.
Nov.-Z.	3,25	6,50	9,75	1,60	5,—	dol.
Port.	100	200	300	50	150	esk.
Sudaf.	2,50	5,—	7,50	1,25	3,75	rnd.
Sved.	18,75	37,50	56,25	9,50	28,—	kr.
Svis.	15,—	30,—	45,—	7,50	22,50	fr.
Usono	3,75	7,50	11,25	1,90	5,60	dol.

El aliaj landoj oni pagu laŭ egalvaloro de la nederlanda tarifo aŭ demandu sian ĉef-delegiton aŭ peranton. Klarigojn de la kategorioj ĉe la kapo de la tabelo oni bv. vidi en Jarlibro de UEA 1967/I, pj 58-59.

NIA ESTRARANO MAURICE JAUMOTTE KAJ "HEROLDO DE ESPERANTO"

Sekve al la akcepto, dum la UK en Rotterdam, de rezolucio, kiu kondamnas la aperigon en "Heroldo" de pluraj artikoloj neaprobindaj, s-ro Maurice Jaumotte, ĝenerala prezidanto de Belga Esperanto-Federacio, kaj estrarano pri fakaj asocioj de UEA, kiu distancigis sin, jam antaŭe, de tiuj aperigoj, kaj kiu kunvoĉdonis la rezolucion, decidis — post plia esploro de la situacio — nun ekŝigi el sia funkcio de "administranto-prezidanto de la belga Societo "Heroldo de Esperanto"". Same faris, el sia funkcio de "administranto", s-ro Henri Sielens, honora vicprezidanto de BEF.

NOVAJ DELEGITOJ

Aperos en la Jarlibro 1968/I, nun preparata.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1967)

Aŭstrujo. Kirchbach.
Brazilo: Maceió: D. São Paulo: FD (Ŝako).
Ĉeĥoslovakujo. Praha: FD (Pomologio) & (Rel.).
Francujo. Grenoble: D & FD (Turismo).
Germanujo. Hamburg: FD (Interlingvistiko).
Hindujo. New Delhi: FD (Komerco).

Italujo. Brescia: D & FD (Instruado). Cremona.
Milano: FD (Industrio). Torino: FD (Hidraŭliko).
Japanujo. Yokohama.
Jugoslavio. Loznica.
Monako. Monte Carlo: VD.
Nederlando. Brummen.
Soveta Unio. Barnaul.
Sud-Afriko. Heidelberg.

NOVAJ PERANTOJ

Hindujo. Hinda Instituto de Esperanto, P.B. 604, New Delhi - 1.
Meksiko: F-ino Alicia Zepeda, Altemirano 75-I, México-4, D.F.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Canet, s-ro R., Alicante, Hispanujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1968

1 Zielinski, s-ro Zb., Aŭstrujo. 2 Behrmann, s-ro Herm., Germanujo. 3 Dijk, s-ro J. P. van; 4 Wensing, s-ro E. L. M., Nederlando. 5 Van Hove, s-ro P., Sud-Afriko. 6 Forslund, s-ro Y., Svedujo. 7 Culbert, d-ro Sidney S.; 8 Pool, s-ro Jonathan, Usono.

FONDAJO CANUTO

Nederlando: Moerbeek, s-ro R., 5 MA.
Al ĉiuj donancintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.
M. H. Vermaas,
Direktorino, C.O.

ANONCETOJ

Internacia Esperantista Semajno julio 1968.
La Departementa Federacio de Drôme en Sud-orienta Francujo organizos Internacian Semajnon de la 18-a de julio ĝis la 25-a de julio 1968. Al tiu semajno la membroj de la Droma Federacio invitas ĉiujn esperantistojn en la mondo, precipe la ĝejnulojn. Petu ĉiujn informojn ĉe la sidejo de la Federacio, 31, strato Pêcherie, F-26-Romans, Francujo.

Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn. Mi nepre respondos. Maria Carmen Maurel, Taquigrafo Marti no. 9 - 2º, Barcelono 14, Hispanujo.

Poŝvortaro Esperanta-hispana, hispana-Esperanta, Sopena. Per rekomendita poŝto vi ricevos ĝin. Sendu ses respondkuponojn al Hispana Esperanto-Instituto, Apartado 2428, Barcelona, Hispanujo.

Sistema, kompleta Katalogo pri Esperanto-Poŝtmarkoj, verkita de V. Váňa, eld. EKI, multobligita, 12 tekstpaĝoj, 3 bildpaĝoj, listo pri UTK. Interesa dokumenta novaĵo. Prezo: 6,50 sv.kr. aŭ 1,25 US-dol., aŭ petu informojn pri pagmaniero. Mendojn akceptas s-ino Anna-Greta Strönne, Amiralsgatan 36, Malmö, Svedujo.

Unu- kaj du-Spesmila moneroj serĉataj. Proponon kun indiko de postulata prezo direktu al Ota Ginz, Reĥov Golomb 5, Kirjat Jam Bet, Israelo. Se vi preferas Esperanto-literaturon interŝanĝe, indiku titolo(j)n.

(daŭrigo dekstre)

Religia kaj katolika literaturo estas mendebla ĉe la eldonejo EKUMENA ESPERANTO, Ch-9106 Zürchersmühle, Svislando. Petu libroliston.

Kial Ne? La inteligenta Esperanto-gazeto por modernaj gejunuloj. Leginda — pensiga — satirema. Unuvorte — la sola gazeto por raciaj homoj. Jarkotizo: 20 steloj/10 ŝilingoj. 'Kial Ne?', 2 Edwina Gardens, Redbridge, Ilford, Essex, Anglujo.

Lernejoj! Partoprenu kun viaj klasoj en la lernigaj rondoj "Graĵoj en Vento". Unikaj en la mondo! Graĵoj en Vento, rue des Pins 66, CH-2500 Bienne-Biel 7, Svislando.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Ĉu vi estas ĝuste informita pri la katolika eklezio kaj ĝia tutmonda agado? Abonu la organon de I.K.U.E., ESPERO KATOLIKA. Jarkotizo svisaj fr. 13.— Mendebla ĉe: Centra Oficejo de IKUE, CH-9106 Zürchersmühle, Svislando.

Se vi interesiĝas pri petrografio, skribu al: s-ro Harry Borchert, Knesebeckerweg 15, D-3395 Bad Grund/Harz, Germanujo.

La Mondcivitana Legitimkarto en Esperanto. La Internacia Registro de l'Mondcivitanoj, kiu de du jaroj konigis la malfermon de naciaj centroj, ankaŭ elektis novan respondeculon por la speciala centro "Esperanto". Ek de nun la esperantistoj sin turnu por peti la enregistriĝon kiel mondcivitano al s-ino Renée Volpelière, 19 Rue Servie, F-30-Nîmes (Francujo). Alia novaĵo: La IRMC decidis alligi la esperantan tradukreton: "MORETO" al tiu speciala centro Esperanto. Pro la nuna disvolviĝo de la mondcivitana ideo tra la mondo Moreto estas prenanta novan antaŭeniron. Fakte oni scias, ke la esperantistaj tradukantoj de la reto efektivas per duobla traduko la plej malfacilajn ligadojn inter ne esperantistaj mondcivitanoj de malsamaj naciaj lingvoj.

Kompletaj jarkolektoj de La Revuo kaj Literatura Mondo, krome multaj aliaj revuoj kaj raraj libroj estas haveblaj ĉe Peranto Iserentant, Brugge, Kerklaan 61, Belgujo.

Jam en sia dua jaro !

GEPATRA BULTENO

sub aŭspicio de UEA

Forumo kaj helpilo por gepatroj, kiuj instruas Esperanton al siaj infanoj. Subtenu ankaŭ vi ilian gravegan agadon per via abono! Aperas kvaronjare, bele multobligita kaj ilustrita.

Redaktas Derrick P. Faux. Jarabono: 3,50 gld. (7 ŝil., 14 st.). Peranto: UEA.

Serio ORIENTO-OKCIDENTO n-ro 4

KALEVALA

la granda nacia eposo de la finnoj
verse tradukis J. E. Leppäkoski



368 paĝoj kun postprezento, lingvaj kaj ilustritaj etnografiaj klarigoj. Pli ol 100 vinjetoj kaj 1000 ornamaj komencliteroj de la fama finna artisto Axel Gallen-Kallela. Formato de "Naŭzo", "Malsata ŝtono" kaj "Rakontoj de Oogai".


Prezo:

tuttele bind. 25,— gld (100 st)

Sola vendrajto ekster Skandinavio: UEA

VOJAĜIMPRESOJ DE EGIPTO

tra Azio kaj Eŭropo per Esperanto



La unua tia okazaĵo en la mez-oriento. Libro originale verkita en Esperanto, kun bele kolorita kovrilo. Prezo: 5 internaciaj respondakupoj.

Mendebla rekte de la aŭtoro:

**D-ro Nassif Isaac, P.O.Box 1221,
Cairo, Egiptujo**

KOLEKTU LA ELDONSERION

ORIENTO-OKCIDENTO

eldonatan sub aŭspicio de UEA

LUKSAJ VOLUMOJ DAŬRE VALORAJ

1. **MALSATA ŜTONO**, sep emociaj rakontoj de la plej glora hinda aŭtoro de modernaj tempoj, Rabindranath Thakur (Tagore). Vive reflektas la socian kaj naturan fonon de Hindujo. El la bengala originalo tradukis L. Sinha. 127 p., 8 ilustraĵoj. Bind. 11,50 gld.
2. **RAKONTOJ DE OOGAI**, kvar diverskarakteraj verkoj de la elstara japana novelisto Mori oogai. Koncizaj noveloj, densaj je dramaj okazaĵoj. Inkluzivas la filmitan "Sansyô-dayû". Kvar malsamaj tradukintoj. 116 p., 2 bildoj. Tolbind. 10,25 gld.
3. **LA NAŬZO**, eksterordinara romano de la franca filozofo-romanisto Jean-Paul Sartre. Intima taglibro de homo, kiu esplorvagas en sia konscio. Bonega traduko de Roger Bernard. Eldono de UEA. 212 p., kun frontispico. Broŝ. 11,70 gld.
4. **KALEVALA**, la grandioza nacia eposo de la finna popolo, plena je mitaj heroaĵoj, praa folkloro, majesta poezio, eĉ humuro. Monumenta, 30-jara traduko de J. E. Leppäkoski, "riĉa rezulto de admirinda fortostreĉo, plena rego super la lingvo, majstra manipulo de formo" (Kalocsay). 368 p., 100 vinjetoj. Bind. 25,— gld.
5. **MARTÍN FIERRO**, iasence la nacia eposo de Argentino, liberritma verko de José Hernández. Vigla, facile fluanta stilo gustanta je la senbrida vivo de la gaŭĉo. Rim-versa traduko de Ernesto Sonnenfeld. 289 p., ĉirkaŭ 1200 strofoj, ilustrita. Bind. 14,40 gld.
6. **REGO LEAR**, unu el la ĉefdramoj de Shakespeare. Brile "Shakespeare-a" versa traduko de la majstro de Esperanta poezio, K. Kalocsay, "decida antaŭpaŝo en la kampo de la viva dramo" (Foote). Emocia enhavo plus ĝue legebla lingvaĵo. Eldono de UEA. 160 p. Bind. 16,50 gld.; broŝ. 14,— gld.
7. **KVIN VIRINOJ DE AMORO**, de Ihara saikaku, klasikulo de la japana erotika literaturo. Kvin ekzotikaj noveloj, kie la aŭtoro lerte intermiksas tragedion kun humuro, pasion kun satiro. Traduko de Miyamoto masao. 159 p., 42 samepokaj ilustraĵoj. Tolbind. 13,— gld.
8. **LA SPLENO DE PARIS**, proz-poemaro de la epokfara franca poeto Charles Baudelaire, laŭ sia enhavo komplementa volumo al la glora verko "La floroj de l'malbono". Tradukis Paul Lobut. 150 p., bindita per artefarita led, ilustrita. 12,50 gld.

Krome, eksterordinara eldono en la serio:

LA DIA KOMEDIO, de Dante Alighieri, mondliteratura verko bezonanta nenian prezenton. Traduko de Giovanni Peterlongo kun paralela itallingva originalo. Lukse bindita, 709-paĝa, kun unika kolekto de ilustraĵoj de Botticelli. 36,— gld.

Aperos baldaŭ pliaj gravaj titoloj

Ĉiuj mendeblaj rekte ĉe la libro-servo de U.E.A.

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando